

# STIFIRO 201

## El la enhavo:

8-a konferenco de ĈEA  
Konsultiĝo de Mez-Eŭropaj Landoj  
IBIRE  
14-a Kultura festivalo  
Fervojista jarkonferenco  
Ĉ. Vidman jubileas  
PEN-centro dekjara  
Jaro de Ekoturismo  
EK al Fortaleza!



## ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**ĈEA-konferenco Poděbrady  
19. - 21. 10. 2001**

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte). **rete Starto:** starto@clavis.cz, www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:** cea.polnický@quick.cz (sekretario) podhradska@volny.cz (prezidanto) www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membroklotizoj:** A 250 Kč. B 150 Kč. D 70 Kč, E 70 Kč, F 5000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč kometantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 02/51817732, m.pluharova@worldonline.cz

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj, pri informatiko

**Komisionoj de ĈEA:** ekzamena, gazetara-informa

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 0324/615651, cea.polnický@quick.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:**

3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady

ISSN 1212-009X

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidantino:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047, podhradska@volny.cz (eksteraj rilatoj, honoraj membroj, E-muzeo)

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02/9912201, fakso 02/9912126 chrdle@kava-pech.cz, (eldonado, UEA, subvencioj)

**Vicprezidanto:** Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice (sekcioj), e-mail: repasyn@iol.cz, tel. 0338/324 287, 0602 800214

**Sekretario:** Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax.. 0324/615651, cea.polnický@quick.cz (kontado, membrobazo)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha (konferencioj, seminarioj), tel. 02/20879386

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na Nábřeží 45/25, 736 01 Havířov-Město, tel. 069/6815253, zd.heiser@post.cz (EK)

**Komitatano-ĉefdelegito de UEA:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha 3, 02-22780677

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakkpce.cz, Libuše Hýblová, Bohotín 136, 789 62 Olšany

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj), starto@clavis.cz

**Lingva kontrolo:** Vlastimil Kočvara  
**Esperanto-muzeo:** Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

**Abonoj de gazetoj:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, vlada\_hasala@iol.cz

## La 8-a konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Poděbrady, 19.-21. 10. 2001

Sabate la konferencon en la agrikultura lernejo salutis vicurbestro Mgr. Miroslav Novák. Post unu minuto da silento pro la forpasintoj la ĉefan paroladon prezentis prezidantino Věra Podhradská. Ŝi laŭdis klubajn aranĝojn kaj informis pri konsultiĝo de reprezentantoj de mez-eŭropaj Esperanto-asocioj en Dobřichovice. La sekretario Pavel Polnický bildigis la ekonomian situacion de la asocio. Post prezento de ĉeestantaj honoraj membroj sekvis riĉa diskuto pri sekcioj, kluboj kaj aliaj aferoj.

Sabatan vesperon fermis jam la tradicia danc-amuzo, kaj dimanĉo estis dediĉita al trarigardo de la urbo

### Iom da statistiko:

La konferencon partoprenis 84 personoj (38 virinoj, 46 viroj) el 54 lokoj, plej multaj el Prago (9), Brno (5), Poděbrady (4), Pardubice (4), Ústí nad Labem (3), Ostrava (3). Eksterlandaj gastoj estis Christian Darbellay (Germanio) kaj Ernő Geleta (Slovakio). En la loka ĵurnalo aperis intervjuo kun la asocia sekretario Pavel Polnický, ne nur pri la konferenco, sed pri Esperanto ĝenerale

### Diskutoj:

Raportoj prezentis la agadon de sekcioj kaj komisionoj (gazetara servo - D. Kočvara, blinduloj - J. Vychodil, IKUE M. Šváček, IFEF - Z. Polák, informadiko

M. Malovec) kaj de rondetoj kaj kluboj: Ĉeĥa-saksa tago en Ústí n.L. (M. Smyčka), Jaro de lingvoj (M. Malovec), ekoturismo (P. Chrdle), infanoj kaj helpo al E-muzeo en Česká Třebová (Z. Novotná), Forumo 2000 kaj Eŭropa Unio (J. Laube), 50-jariĝo de SET Lančov en 2002 (P. Sittauer), AEH (J. Hron), Skokovy (J. Drahotová), Kolektoj de esperantajoj (Geleta), FISAC (Z. Polák), Masaryk-universitato kaj kurso por instruistoj (J. Vojáček), Balta renkontiĝo (L. Rýznar), laboro de kluboj (Z. Heiser) k.a.

### Trarigardo de Poděbrady

Dimanĉe antaŭtagmeze venis Mgr. Marie Prchalová el la loka muzeo (komencanta esperantistino), kiu prezentis al la konferencanoj la banurbon Poděbrady.

La kuraca akvo estis trovita hazarde antaŭ cent jaroj, kiam oni serĉis en la kastelo akvon por nova puto (por ke la popolo ne trinku el la nobela puto). Ekde 1908 jam Poděbrady akceptadis unuajn pacientojn. Ĉe la placo de Georgo de Poděbrady, brava ĉeĥa reĝo (1420-1471, kronita 1458) ŝi rakontis ne nur pri la starigo de la rajdista statuo de la reĝo fine de la 19-a jarcento, sed ŝi atentigis ankaŭ pri la angula domo, kie vivis avino de Franz Kafka, al kiu la estonta verkisto veturadis ferii kiel knabo. El la kastela muzeo ni transiris kelkajn metrojn al la Ĉeelba muzeo, en kies arealo en apuda dometo estas nun instalita duĉambra ekspozicio pri Esperanto, aranĝita de Ladislav Fiala okaze de la 90-jariĝo de Esperanto en la urbo.



### **Laboro de la komitato**

La komitato dum la lasta periodo kunvenis 5-foje laŭ la duonjara plano. La kunvenoj okazas en la loĝejoj de unuopaj komitatanoj kaj kunlaborantoj pro motivo de ŝparado. Ĉiuj funkciuloj laboras hejme, sed plejparte rete kontakteblaj.

### **Retkomunikoj**

Por pli rapida informado estis komence de 2001 fonditaj ĈEA-retkomunikoj. Bedaŭrinde ili ne funkcias kiel necesus, ĉar mankas respondeca redaktoro. Se iu el Vi volas kaj povas helpi bonvolu aliĝi.

### **Scienc-teĥnika biblioteko**

La komitato ĝis nun ne sukcesis translokigi sciencteknikajn librojn el Kladno al Libroservo en Běchovice, sed la afero devas esti plenumita ankoraŭ antaŭ la 10-a kongreso de ĈEA.

### **Gvidlibro de ĈEA**

En la konferencaj materialoj ĉiuj ricevis broŝuron *Aktuální a stručný průvodce Českým esperantským svazem* (Aktuala kaj konciza gvidlibro tra ĈEA), aktualigota post unu jaro,

### **Komuna kongreso germana-ĉeĥa**

La komitato de ĈEA pritraktis eblecon organizi denove komunan konferencon kun GEA, (en Karlovy Vary antaŭ kelkaj jaroj ĝi estis tre sukcesa) kaj estas preta okazigi ĝin post interkonsento kun GEA en la jaro 2003 aŭ 2004. Pro tio ankaŭ ĉeestas ĉi tie nia kara gasto s-ano Christian Darbellay - GEA-respondeculo pri kongresoj.

### **Malpropagando**

Iu Franco preparis en fuŝa ĉeĥa lingvaĵo folion kun Esperanta gramatiko, kiun li eldonis en Francio por helpi al Esperanto, sed la efiko estas mala. ĈEA protestis, sed malperməsi ne povas. Simile ne eblas polemiki kun anonimulo, kiu sub pseŭdonomo Pakus ĝenas per siaj nerealigeblaj proponoj diversajn ĵurnalojn kaj ŝtatajn organizojn, inkluzive ministeriojn, postulante dekretan enkondukon de E-o en lernejojn (li mem konfesas, ke li konas el E-o nur kelkajn vortojn).

### **Laŭdo**

Siajn jubileojn digne festis kluboj en Brno (100 jaroj), Poděbrady kaj Olomouc (90 j), Znojmo (45 j). Tradiciaj aranĝoj estis Adonido en Ratíškovice, IRDEN Plavy, Kultura Festivalo kaj Ĉeĥa-Saksa tago en Ústí, Esperanta Silvestro en Česká Třebová, renkontiĝoj en Svitavy kaj Polička. Pedagogie aktivis Paroligaj kursoj (Dobřichovice kaj Ĉ. Třebová), tendaroj en Lančov, Sebranice kaj Nekvasovy, printempa kaj aŭtuna seminario en Skokovy, Klerigaj tagoj en Jetřichovice. Prago gastigis KAEST, Tábor IFEF-kongreson, Strážnice OSIEK-konferencon kaj Poděbrady la asocian konferencon. Esperanto-muzeo en Ĉ. Třebová arkivas 6310 librojn. Nova aranĝo estas biciklista renkontiĝo IBIRE en Doksy. Most kaj Mladá Boleslav havas interesajn retajn paĝojn. En laboro kun infanoj eminentas Okříšky, Ĉ. Třebová, Ratíškovice, Prostějov.

*(Certe ni ankoraŭ ion forĝesis kaj petas pardonon.)*

## Konsultiĝo

En septembro en Dobřichovice okazis la 5-a konsultiĝo de la Landaj Esperanto-Asocioj de Mez-Eŭropo, kiun partoprenis reprezentantoj de la Landaj Esperanto-Asocioj el Hungario, Kroatio, Pollando, Slovakio kaj Ĉeĥio. La traktado daŭris 3 tagojn, organize kaj finance subtenis ĝin Petr Chrdle per sia firmao KAVA-PECH. Akceptita rezolucio post traduko en la landajn lingvojn estis sendita al la ĉefaj ŝtataj oficialaj organoj de la koncernaj landoj: ŝtatprezidentoj, ĉefministroj, ministroj pri eksterlandaj aferoj kaj prezidantoj de la parlamentoj.

## Rezolucio

La reprezentantoj de Landaj Esperanto-Asocioj el Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Pollando kaj Slovakio, kunvenintaj en Dobřichovice, Ĉeĥio, inter la 21-a kaj 23-a de septembro 2001

konsciante, ke:

- konservado de la naciaj kulturoj apartenas al vivgrava esenca bezono de ĉiuj popoloj,
- la naciaj lingvoj estas la ĉefaj portantoj de la naciaj kulturoj,

konstatas, ke:

- La modernaj teknikoj pli liberigas kaj pli intensigas fluon ankaŭ de la kulturaj varoj en la mondo
- la fluo de kulturaj varoj ne estas egala; grandparte ĝi direktas de la riĉaj landoj al la malpli riĉaj,

- la landoj de Mez-Eŭropo ne estas sufiĉe preparitaj por ekvilibri la interŝanĝon de kulturoj kaj defendi siajn lingvojn kiel ĉefajn partojn de sia nacia kulturo.

Pro tio ili alvokas la ĉefajn gvidantojn de mezeŭropaj landoj:

- certigi la lernadon de minoritataj lingvoj uzataj en la koncernaj landoj,
- apogi la lernadon de lingvoj de najbaraj landoj,
- uzadi la ĉi-suprajn lingvojn en reciproka komunikado,
- ekuzi la neŭtralan lingvon Esperanto en la komunikado inter diverslingvanoj anstataŭ la kutimaj naciaj "mondlingvoj", tiel certigante la egalrajtecon de la lingvoj harmonie kun la bazaj principoj de Eŭropaj Unio.

En Dobřichovice, la 23-an de septembro 2001

*Věra PODHRADSKÁ*

prezidantino de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

*PRINCZ Oszkár*

ĉefsekretario de Hungara Esperanto-Asocio

*Ankica JAGNIĆ*

vicprezidantino de Kroata Esperanto-Ligo

*Stanislaw MANDRAK*

prezidanto de Pola Esperanto-Asocio



## Internaciaj biciklistaj renkontiĝoj (IBIRE)

IBIRE estas nova mallongigo en Esperantujo, kiu signifas Internacia biciklista renkontiĝo - aranĝo, kiu unuafoje okazis inter la 5-a kaj 9-a de septembro en Doksy (CZ) kun tritaga antaŭaranĝo en Dobřichovice apud Prago kaj kiu laŭ la interkonsentoj de la partoprenintoj fariĝos tradicia ĉiujara renkontiĝo de biciklantaj esperantistoj.



Jam la unua IBIRE altiris 18 partoprenantojn el 4 landoj (Francio 4, Germanio 4, Slovakio 2, Ĉeĥio 8), duono el ili venis pli frue por povi komune bicikli jam en Praga ĉirkaŭaĵo kaj iom konatiĝi kun Prago.

Dum la antaŭaranĝo oni biciklis nur du tagojn tra la valo de la rivero Berounka kun la naturaj kulisoj de Bohemia Karsto, la tria tago, senbicikla, estis dediĉita al la trarigardo de la ĉefaj pragaj vidindaĵoj.

Doksy, centro de la regiono de Mácha, surborde de la plej granda nordbohemia lago - Máchovo jezero (Lago de Mácha), kaj precipé ĝia ĉirkaŭaĵo, kiun la partoprenantoj ekkonis biciklante, rapide klarigis al ĉiuj, kiam la regiono allogadis la plej konatan ĉeĥan romantikan poeton Karel Hynek Mácha. Laŭ la itineroj preparitaj de sperta biciklistino kaj esperantistino Renata Mauserová kaj sub ŝia gvidado, ĝuis la partoprenantoj ne nur bicikladon, sed dum la paŭzoj ili ankaŭ konatiĝis kun la ĉefaj vidindaĵoj kaj historio de la regiono.

Dum la vesperoj, malgraŭ la laceco, oni esperantumis ludante, sed ankaŭ diskutante, krom alie pri la taŭgeco kaj daŭrigendo de IBIRE kun la jam menciita rezulto, ke ĝi fariĝu ĉiujara tradicio.

La ĉefaj trajtoj de IBIRE restu la samaj ankaŭ estonte: Grava diferenco de Biciklistaj karavanoj organizataj de BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia) estu, ke oni loĝu en unu loko en se eble favorpreza hotelo aŭ pensiono, ke oni do ne devu porti siajn proprajn biciklante de unu loko al la alia. Oni havu preparitajn itinerojn por komuna biciklado laŭ la tereno inter 40 ĝis 60 km, ne pli, tamen kun eblo plilongigi ilin por pli sportemaj partoprenantoj - aŭ, prefere, oni kreu du grupojn laŭ la pritaksoj de siaj fortoj. Kaj pro la loĝado en unu loko oni povu senprobleme rezigni dum iu tago pri la biciklado kaj ripozi (ekzemple promene, kion ankaŭ kelkaj pli aĝaj faris ĉijare). Kaj oni havu je dispono ĉambron por vesperaj programoj por povi komune esperantumi.



Ne estas miro, ke jam la unuan aranĝon preparitan laŭ tiuj principoj partoprenis ne nur junuloj, sed la evento venigis biciklantojn de diversaj aĝoj (ĝis la 75jara franca franco, kun meza aĝo 49 jaroj, tamen ĉiuj anime perfekte junaj!). Ĉiuj forveturis kontentaj malgraŭ tio, ke la pluveta vetero ne tro kunludis kun la organizantoj.

La venontjara IBIRE okazos 2002-09-09/14 en Dobřichovice apud Prago (kie ĉijare okazis la antaŭaranĝo). Oni biciklos tra Bohemia Karsto kun pitoreska pejzaĝo kaj multaj turismaj vidindaĵoj - krom unu senbicikla tago, dum kiu la partoprenantoj povos denove ĝui la etoson de la historia kerno de Prago - memkomprene kun klarigoj en Esperanto. Ĝi ne plu estos disdividita je du partoj, sed ĝi daŭros 6 tagojn kun eblo ĝin plilongigi je pliaj kelkaj tagoj.

Se iu volas ricevi ĝustatempe pli precizajn informojn, sendu neniel sin-

devigan interesignon al

chrldle@kava-pech.cz

(per klasika poŝto Petro Chrdle, Anglická 878, 25229 Dobřichovice) kaj li ricevos ĝustatempe rektajn informojn kun la aliĝilo.

## 20-a Ĉeĥa-Saksa Tago

Esperantista klubo de Jiří Kořínek en Ústí nad Labem kunlabore kun "Asocio Saksa Svisujo" el Pirna aranĝas jubilean 20-an Ĉeĥan-Saksan tagon sabate la 8-an de decembro 2001 en Urba muzeo Ústí nad Labem kun prelega matineo, komuna tagmanĝo en Hotelo Palace, ekskurso en la urbo (zoo, muzeo) kaj programo de Esperantaj versoj, kantoj, muziko kaj danco. Eventuala dimanĉa programo por tranoktanoj. Se vi bezonas tranokton, skribu aŭ telefonu al: Miroslav Smyčka, Kojetická 90, 400 03 Ústí nad Labem (tel. 047/55 324 17 aŭ 0723/158 763)



### OSIEK-PREMIO 2001

En '01 la OSIEK-anoj proponis 20 verkojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de *La Gazeto*. La 20an de julio, dum la IEK en Straznice, Ĉeĥa Respubliko, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

**Ēli URBANOVA**

pro originala verko:  
*Hetajro dancas*

Gratulon!

La premio, 400 eŭroj, rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verko ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro.

informoj: *La Gazeto*, 55210 Creuŝ kaj <http://osiek.org>

krokizo de Mэгumi Sacha-Komamura

## 14-a Internacia Kultura Festivalo

La 14-an Internacian Kulturenan Festivalon jam tradicie aranĝis Esperanto-klubo en Ústí nad Labem dum la tagoj 28a-30a de septembro 2001.

Celo de la jam tradicia aranĝo estas firmiĝo de internacia kunlaboro de la ĉeĥaj kaj eksterlandaj esperantistoj kaj eluzo de la internacia lingvo Esperanto por prezento de - speciale ĉeĥdevena - muzika kaj literatura artoj.

La festivalon partoprenis ĉ. 60 gesamideanoj el Germanio, Pollando, Slovakio kaj Ĉeĥio, kiujn salutis vendrede vespere prezidanto de la loka E-klubo M. Smyčka kaj anoncis, ke aliĝintaj ges-anoj el Svedio, pro malfunkcio de ilia aŭtomobilo, devis reveni hejmen.

Sabate matene okazis pretega kaj diskuta matineo gvidata de prof. d-ro V. Novobilský, al kiu kontribuis E. Geleta, Slovakio, I. kaj D-ro T. Ejsmont, Pollando, N. Karbe, Germanio, B. Bouzek, Ing. J. Werner, J. Laube, O. Antoš kaj membroj de E-klubo Mladá Boleslav (per video-filmo pri sia urbo kun E-komentario). Al esperantistoj en Novjorko, Usono, oni forsendis kuneŝtan mesaĝon rilate la terorisman atakon kontraŭ la Monda negoc-centro en NYC la 11-an de septembro 2001.

Sabate posttagmeze okazis en la preĝejo de Sta Paŭlo homanarisma spirita koncerto "Toleremo inter religioj", en kiu muzikajn kaj kantajn programerojn (komponitajn ekde la 10-a jarcento),

plejparte en Esperanto, prezentis K. Kudlíková, A. Proklov kaj M. Smyčka sub orgen-akompano de V. Urban.

Sabate vespere okazis solena muzika, kanta kaj deklama vespero honore al la E-korifeoj Jiří Kořínek kaj d-ro Tomáš Pumpr. La publiko atenteme aŭskultis kaj varme aplaudis programerojn prezentitajn de Blovinstrumenta kvarteto (V. Vanc, P. Zarkov, J. Machuta, T. Vanc), kiu prezentis verkojn de J. L. Dusík, P. Charpentier, A. Michna z Otradovic, J. Stanley, J. Clarke kaj W. Boyce. Sekvis operarioj de Ch. Gounod, N. Rimskij-Korsakov, G. Rossini, F. Flotow, J. Offenbach kaj G. Verdi, operet-arioj de J. Strauss, N. Dostal kaj C. Zeller, naciaj kantoj ĉeĥaj kaj rusaj kaj originaj kantoj de J. Púchová (laŭ tekstoj de M. Bronštejn) en la prezento de K. Kudlíková, J. Púchová, M. Smyčka, A. Proklov pianakompanataj de V. Urban. Plie oni aplaudis la 1-an movimenton de la violona koncerto de P. I. Čajkovskij (Z. Urbanová), 1-an movimenton el violoncela koncerto de J. Ch. Bach (Vojta Urban) kaj poezion de Jarostav Seifert, omaĝe al 100-a datreveno de lia naskiĝo en traduko de J. Kořínek (V. Novobilská).

Oni povas konstati, ke la preskaŭ trihora koncerto, laŭ sia kvalito, ne havas en nialandaj E-klubo analogion. Pri la evento raportis radiostacio Ústí nad Labem kaj la televido Prima.

Dimanĉe okazis ekskurso al Krupka, kie oni vizitis muzeon de ministoj.

*Miroslav Smyčka*



## Jarkonferenco de fervojistoj

"En kadro de la Tagoj de Eŭropa kultura heredaĵo okazis en la tagoj 7-an ĝis 9-an de septembro 2001 en moravia urbo Olomouc la 35-a jarkonferenco de Ĉeĥa landa asocio de IFEF.

Dum labora parto la ĉeĥaj fervojistoj en ĉeesto de la gastoj el Aŭstrio, Nederlando kaj Pollando pritraktis sian agadon kaj planon de sia agado por venonta periodo.

La ĉefa punkto de la agado en 2001 estis sukcesa organizo de la 53-a IFEF--kongreso de la 12-a ĝis 19-a de majo en sudbohemia historia urbo Tábor, en kunlaboro kun Kongresa kaj kleriga entrepreno KAVA-PECH kaj Ĉeĥa Landa Konsilio FISAIC ĉe ĈD, sub alta protekto de la Ĝenerala direktoro de ĈD ing. Dalibor Zelený. La kongreson krom honoraj gastoj partoprenis 194 partoprenantoj el 18 landoj.

Ĉeĥaj fervojistaj esperantistoj partoprenis vicon da aliaj aranĝoj organizataj de IFEF kaj ĝiaj landaj asocioj, prezentis vicon da fakaj prelegoj, kunlaboris en agado de Terminara sekcio de Faka komisiono de IFEF, en tradukado de fakaj artikoloj kaj ilia aperigo en fervojista gazetar, eldonado de Fakaj kajeroj kaj vico de aliaj aranĝoj, ekzemple ili kunlaboris en preparo de la plaĉaspekta publikajo eldonita okaze de la 160-a datreveno de la Norda Fervojo de la Imperiestro Ferdinando Vieno-Přerov-Olomouc, transdonita al publika trafiko en jaro 1841, kun resumoj krom

lingvoj angla kaj germana ankaŭ en Esperanto.

En plua programo la partoprenantoj de la jarkonferenco aŭskultis prelegon pri ĝusta uzado de fervojfakaj terminoj en Esperanto, trarigardis la Ĉefan fervojan stacion en Olomouc kun stacidomo kaj antaŭstacia spaco en Olomouc, kie okazis antaŭ 10 jaroj nia 43-a IFEF-kongreso (la unuan fojon en estinta Ĉeĥoslovakio), spektis videofilmon pri tiu ĉi kongreso kaj sub gvido de la sperta ĉiĉerono Ladislav Láni vizitis multajn elstarajn memorajojn de tiu ĉi kvina plej granda urbo en Ĉeĥa respubliko, prave nomata "perlo sur la verda kuseno", la plej historia urbo post Prago: la Kolono de la Plejsankta Triunuo, la unikan memorajon konstruitan en baroka skulptarta kaj arkitektura kreado de la unua duono de la 18-a jarcento, enlistigita sur nomlisto de la tutmonda heredaĵo de UNESCO, la Ĉefepiskopan palacon, Universitaton Palacký, Ŝtatan sciencan bibliotekon, monaĥejon Hradisko, urbodomon kun fama turhorloĝo, la katedralon de sankta Venceslao, kastelon de Přemyslidoj, Muzeon de la arto, preĝejon de la Virgulino Maria la Neĝa, Patrujsciencan muzeon, Bazilikon minor de la Virgulino Maria sur Sankta Monteto apud Olomouc kaj aliajn vidindaĵojn.

*Jindřich Tomíšek*



## Ek al la UK en Fortaleza internacie jam el Prago!

La Kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle KAVA-PECH organizos tradicionan karavanon al la UK kaj jam nun klaras, ke ĝi estos denove internacia de la komenco - Praga flughaveno, ĉar estas seriozaj interesatoj minimume el Germanio kaj Slovakio. La karavano daŭros entute 16 tagojn, kun forflugo el Prago la 1-an de aŭgusto je 17:35 kaj alflugo reen la 16-an de aŭgusto je 20:25. Krom la trimiliona kongresurbo Fortaleza, kiu disponas kun la plej famaj plaĝoj kaj la plej granda akvoparko en la tuta sud-amerika kontinento kaj Rio de Janeiro, unu de la plej belaj urboj de la mondo, oni ekkonos pliajn allogaĵojn en la ĉirkaŭaĵoj de tiuj belegaj urbegoj. La antaŭvidita prezo de la karavano estas 70.000.-Kĉ inkluzive la leĝe devigan asekuron de la vojaĝagentejo KAVA-PECH kontraŭ bankroto.

La interesatoj skribu al Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, aŭ, se vi povas, retmesaĝu al <chrdle@kava-pech.cz> por ricevi pli precizajn informojn kaj aliĝilojn. Ne forgesu, ke estas saĝe decidiĝi rapide, ĉar por pagi la plej favoran kongreskotozon vi devas ĝiri la monon al UEA (Rotterdam) ĝis la fino de ĉi tiu jaro aŭ al KAVA-PECH (oficiala UK-peranto por Ĉeĥio) ĝis la 29-a de decembro (la lasta tago, kiam devas la mono ekasperi sur la konto), ke ĝi sukcesu informi la CO de UEA ĝis la fino de la jaro.

*Petro Chrdle*

## IV-a kongreso de AEH-IKEH

14.21.IX. 2002

Jánské Lázně

Asocio de E-handikapuloj kun sia Internacia klubo aranĝas la IV-an kongreson en Jánské Lázně en la tagoj 14.-21.9.2002. La kongresa temo: **Ŝlosilo al amikeco inter handikapuloj**. La partoprenkotizo inkluzivas loĝadon, 2 manĝojn ĉiutage, kongresajn materialojn kaj riĉan E-programon, kiu antaŭvidas prelegojn, videofilmojn, diapozitivojn, ankaŭ busajn kaj piedajn ekskursojn kaj elektojn de la nova estraro. La tutsemajna kotizo por eksterlandanoj estas 150 eŭroj (post 30.3.2002 jam 160 eŭroj), por ĉeĥaj AEH-anoj 2700 Kĉ. La aliĝilojn akceptas Internacia klubo de esperantistoj-handikapuloj, Na Okrouhlíku 953/21, CZ-530 03 Pardubice



## 11-a Adonido Ratíškovice 19.-21.4.2002

La tradicia renkontiĝo de esperantistoj kun rara floro kaj bonega vino okazos jam la 11-an fojon. Kontaktadreso por Adonido estas Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice.

## Internacia Jaro de Ekoturismo

Kiel konate, UNO kaj UNESCO deklaris la jaron 2002 "Internacia jaro de ekoturismo". Malgraŭ tio, ke jam la nomo diras multon, mi klarigu precize, kion ni komprenu sub la termino "ekoturismo". Temas do pri ĉiuj specoj de turismaj aktivadoj, kiuj ne postlasas detruajn spurojn en la naturo. Ofte ĝi estas nomata en la ĉeĥa faka literaturo (sub influo de la angla) mola turismo, ĉeĥe "měkký turismus", sed ankaŭ "naturafabla turismo" (sub influo de la germana), sed al mi ne tre plaĉas tiuj esprimoj se apude ekzistas tute klara kaj internacie komprenebla termino ekoturismo.

Konkrete temas pri jenaj specoj de turismo: piedturismo inkluzive la montaran, biciklado, senmotora boatado, surĉevala rajdado kaj skiturismo. Do certe ne la aŭtomobila aŭ aŭtobusa, nek la nun furoranta motorbicikla turismado.

Ĉar mi estas fervora apoganto de ĝi estas klare, ke mi volas subteni la internacian jaron de la ekoturismo per la aktivecoj de mia agentejo, precipe por esperantistoj, por povi kunigi tion kun mia alia hobbio - Esperanto. Tial mi aranĝos jam printempe en la montaro Ŝumava (deklarita "pejzaĝo de la jaro" en 1999/2000) 5-tagan ekoturisman seminarion, dum kiu oni dumtage piede ekkonos la belecon kaj valoron de la montara pejzaĝo kaj dum vesperoj ĝuos ekologiajn kaj ekoturismajn prelegojn

kaj diskutos pri la temo. La dato ne ankoraŭ estas fiksita, ĉar mi strebas kunordigi la daton kun Bavaria Esperantio-Asocio, ke ne enestu tempa koincido, sed tre verŝajne ĝi estos komence de aprilo, dum kiu periodo la naturo vekiga de la vintra dormo.

Kaj aŭtune, 2001-09-09/14 okazos en Dobřichovice la 2-a IBIRE (Internacia biciklista renkontiĝo) - post la sukcesa unua IBIRE en Doksy, kiun partoprenis 18 biciklantaj esperantistoj el 4 landoj (CZ, DE, FR, SK) jam estas realtive granda eĥo kaj antaŭaligintoj al sekvantaj IBIRE krom la menciitaj landoj ankaŭ de GB, IT kaj NL.



Do, fine de ĉi tiu artikoleto mi petas ĉiujn, kiuj ankaŭ ŝatas krom Esperanto aktivadojn apartenantaj al la ekoturismo aliĝi al mi por ke ni kreu neformalan subaron de Esperantujo, kiu reciproke informiĝos pri ekoturismaj aranĝoj kaj interŝanĝos spertojn kaj opiniojn tiurilatajn. Se iu alia jam planas organizi skiturisman aranĝon ĉivintre, mi volonte legos pri ĝi kaj se mi estos tiutempe libera certe ankaŭ partoprenos, se ne, mi pretas organizi ĉivintre krom la menciitaj aranĝoj ankaŭ skipilgrimadon, verŝajne en la montaro "Jizerské hory". Tial antaŭ interesatoj pri skiturimado bv. sciigi min pri viaj interesoj.

*Petro Chrdle*



## Ĉestmír Vidman - 80-jara

Nia poeto-esperantisto naskiĝis la 31-an de oktobro 1921 en la itala Monfalcone. Realan gimnazion li studis en Příbram, de la kvara klaso en Malá Strana de Prago, kie li abiturientiĝis 1939. Sekvis altlernejo kaj titolo de inĝeniero. En Poldi Kladno li laboris kiel oficisto (1941-45), poste kiel eksporta oficisto ĉe Organizo de Eksterlanda Komerco (1947-82).

Lia verkaro konsistas precipe el poezio kaj dramo. Lia ĉeflingva poezio: *Moře* (Maro, 1972); *Miska rýže* (Pladeto da rizo, 1972), *Vteřiny slunečních hodin* (Sekundoj de sunhorloĝo, 1975), *Hra zvaná život* (Ludo nomata vivo, 1977), *Čím se líčíte, Ičiki* (Per kio vi ŝminkas vin, Iĉiki, 1979), *Pod horou Fudži* (Sub la monto Fujj, 1980), *Křížalami voní dálka* (Lontano aromas de sekpomoj, 1981), *Cestou* (Tra la vojo, 1986), *Vyhližení k domovu* (Sopira rigardo al la hejmo, 1992).

Esperantlingve aperis liaj versoj en kolektoj *Niaj aŭtoroj sin prezentas* (1980), *Kvarfolio* (1985), *La nuntempaj ĉeĥaj poetoj en 1000 versoj* (1989) kaj *neregule aperadis liaj versoj en Starto*, kutime en tradukoj de J. Rumler.

Liaj teatraĵoj: *Sama mezi všemi* (Sbla inter ĉiuj, 1985), *Půlstoletí pod šminkou* (Duonjarcento sub ŝminko, 1987), *Tvář herečky* (La vizaĝo de aktorino, 1989), *Já, Kunhuta, královna česká* (Mi, Kunhuta, reĝino de Bohemio, 1990), *Já, Eliška Přemyslovna, královna česká* (Mi, Elizabeta Přemislidino, reĝino de Bohemio, 1991), *Já, Alžběta Rejčka*,

*někdy královna česká* (Mi, Elizabeta Rihensa, iama reĝino de Bohemio, 1992), *Stopa Locacorten* (Spuro Locacorten, 1993), *Paň v erbu lvice* (Sinjorino kun blazono de leonino, 1994), *Brala jsem drogy* (Mi prenadis drogojn, 1996).

La dramon pri Elizabeta Přemislidino ludis Eva Seemannová en sia propra traduko. Ĉestmír Vidman ofte kunlaboris kun la radio.

Ĉijare la 5-an de oktobro aperis en la ĉeĥa literatura gazeto OBRYS-KMEN lia artikolo *Halas v esperantu* (Halas en Esperanto), kiu estis omaĝo ne nur al centjariĝo de la granda ĉeĥa poeto František Halas (3. 10. 1901 - 17. 10. 1949), sed ankaŭ al lia esperantlingva interpretisto Josef Rumler (1922-1999), kiu esperantigis multajn aliajn ĉeĥajn poetojn inkluzive de Vidman mem.

La 18-an de oktobro en la praga PEN-klubo realiĝis programo "Cesta za jasem" omaĝe al Ĉestmír Vidman, el kies verkoj legis eminentaj profesiaj aktoroj Gabriela Vránová kaj Rudolf Pellar (kiu estas ankaŭ bonega tradukisto el la angla kaj germana).



Dekstre tri poemoj de Ĉestmír Vidman en tradukoj de J. Rumler (*En kimonoj*) kaj M. Malovec (*Humoro, Pacienco*).

ČESTMÍR VIDMAN

## V KIMONECH

V motýlích barvách oblečená  
nalévá čaj v ústraní sedá  
s úsměvem perel bíle bledá,  
kamélií slunce tiše ozářená

Pozpátku se vrací  
stále předkloněna  
drobná něžná pilná  
čítanková žena

## Nálada

Čas najednou zmizel  
Je ráno? Je večer?  
Hodina před polednem?

Balon lehčí vzduchu  
na mne mává  
nad tratí

Probuzení  
To nadlehčení  
už se nevrátí

## Trpělivost

Čekat  
o chlebové skývě  
vyprahlé žízni  
trýzni okoralé

Konečně déšť  
Zem lačně pije  
až do dna  
ze džbánů poezie

ČESTMÍR VIDMAN

## EN KIMONOJ

En robo papilikolora  
ŝi enverŝas teon oran  
flanke sidanta perle ridetanta  
blanke pala sune kamelia kviete vuala

Retro revenanta tenera  
ĉiam en antaŭklino  
eta diligenta vera  
legolibra ino

## Humoro

La tempo subite malaperis  
Ĉu matenas? Ĉu vesperas?  
Ĉu mankas horo ĝis tagmezo?

Balono malpli peza ol aero  
gestas al mi  
super fervojo

Vekiĝo  
La suprenleviĝo  
plu ne revenos

## Pacienco

Atendi  
kun panresto nura  
dezertseka soifo  
turmento kaduka

Finfine pluvo  
La tero glute trinkas  
ĝis la fundo  
el kruĉo poezia

## Kun fervojo al tria jarcento

Sub tiu ĉi devizo okazis en la tagoj 21-an ĝis 23-an de septembro 2001 en pola distrikta urbo Malbork la 17-a kongreso de Polaj Esperantistoj Fervojistoj.

La kongreson partoprenis pli ol sesdek polaj gekolegoj kaj gastoj el kelkaj landoj, inter ili d-ro Renato Corsetti, prof. de Roma Universitato kaj prezidanto de UEA, prof. d-ro Helmar Frank, la rektoro de AIS en San Marino, prof. d-ro Dieter Quednan kaj doc. Alicja Lewandorska de la sama institucio, invititaj estis inter aliaj ankaŭ prof. d-ro Bojĵidar Leonov, rektoro de Privata Esperantista Universitato en Karlovo, Bulgario kaj prof. d-ro Marcos Salas de Suda Universitato en Ĉilio.

Malbork estas distrikta urbo kun longa historio, komencanta en la 1276 j. Ĝi estas fondita de la monaĥoj-kavaliroj, anoj de la Hospital-Ordeno de la Sankta Maria de Germana Domo = Teŭtona Ordeno, en Pollando oni nomis ilin "kruĉistoj".

Gazetara konferenco, solena inaŭguro, labora kunsido kun elekto de la nova estraro kaj arta programo okazis en la Urba Kulturdomo ĉe Slava placo.

Sabata antaŭtagmezo post Esperanta S-ta Meso celebrata de pastro Jozefo Zielonka, animzorganto de katolikoj-esperantistoj por Pollando estis dedicate al solena malkovro de la E-ŝtonoj, ĉe la elektitaj arbetoj sur la Skvaro Esperanto,

kie troviĝas kvarangula Esperanto parko enmeze kun monumento de d-ro L. L. Zamenhof, apud la parko kun naciaj arboj kaj memorŝtonoj kun surskriboj, flagoj kaj datoj (ĝis nun de la landoj Koreio, Ĉilio, San Marino, Italio, Germanio kaj aliaj) troviĝas ankaŭ moderna hotelo Esperanto, kies personalo krom la jam uzataj mondlingvoj parolos ankaŭ internacian lingvon Esperanton.

Dum la solenaĵo amase partoprenata de la urba loĝantaro la artan programon plenumis inter alia infana ensemblo "Muchomorki - Amanitoj" el antaŭlernejo n-ro 10 en Malbork, kiuj surprizis la publikon per scenoj kaj kantoj en bona Esperanto, "Kapela Kociewska" el urbo Starogard

Gdański kaj junulara popola ensemblo "Modraki" el urbo Pelplin. Dum la aranĝo prezentis sin ankaŭ ĉeĥa delegacio de la fervojistoj, kiu plantis nian nacian arbon, tilion. Ĉu oni estonte aldonos al ĝi ankaŭ memorŝtonon kun nacia flago kaj surskribo en E-lingvo?

Sabate posttagmeze oni buse ekskursis al urbo Pelplin, kie oni vizitis Katedralon kaj Diocezan Muzeon kun riĉaj artokolektoj kaj poste metis bukedon da floroj sur tombo de la episkopo-esperantisto Konstanty Dominik sur la tombejo en Pelplin.

Vespere dum internacia balo en urba Kulturdomo ĉe la Slowianski-placo oni babilis, amuzis sin kaj dancis ĝis noktomezo."





Dimanĉe post matena S-ta Meso en Esperanto en preĝejo de Dipatrino de la Senĉesa Helpe (komune kun urba loĝantaro, kiu dum prediko estis informata ankaŭ pri Esperanto kaj pri la Fervojista kongreso) oni komune vizitis la ege interesan tripartan, brikan kastelon, situantan sur la dekstra bordo de Nogat-rivero, la kastelon de la Teŭtona Ordeno de la Kruckavaliroj, en Pollando nomataj "krucistoj", la fortreson agnoskitan en la j. 1994 kiel historia monumento kaj en la j. 1997 honorigita per la enskribo sur la UNESCO-Listo de Monda Kultur-Heredaĵo.

Esperanto en Malbork havas longan tradicion. En la urbo estas ĉ. 40 esperantistoj, kunvenoj okazas regule unufoje monate. E-kursoj ĉiusemajne en la Malnova Urbodomo. En la Publika Biblioteko "Bona Novaĵo" estas riĉa Esperanto-Fako, ĝi troviĝas ĉe Kristana Baptista Preĝejo, Str. Jagiellonska 105 apud la Zamenhof Placo. Krome unufoje monate okazas Esperanto-Diservo en Katolika Paroĥo al la Descendo de la S-ta Spirito, Str. Nogatowa 7, sabate je la 14- 15-a horo, poste ĉe la preĝeja klubejo. E-renkontiĝo gvidata de la pastro, mag. Eugeno Grzesik. Surloke oni ankaŭ povas ricevi la E-prospektojn senpage.

*Jindřich Tomášek*

*Sur la foto de Henryk Jankowski (str. 127): La ĉeĥa delegacio plantas en parko Esperanto en Malbork la ĉeĥan nacian arbon - tilion.*

## Katolika sekcio IKUE

La sekcio havas 197 membrojn kaj eldonas kvarfoje jare la gazeton *Dio benu*, disponeblan ĉe interreto ([www.mujiweb.cz/Spolecnost/svacek](http://www.mujiweb.cz/Spolecnost/svacek)), por nevidantoj surbendigata. La jam 20-a tendaro en Sebranice (4.-11.8.2001), instruis 50 personojn el 6 landoj (Germanio, Hungario, Pollando, Rusio, Slovakio kaj Ĉeĥio) kaj vizitis ĝin gastoj el Francio kaj Japanio. La sekcianoj aktive partoprenis okazigon de la 15-a ekumena kongreso, ankaŭ de la junulara en Zagrebo, kien ili aranĝis buskaravanon. M. Šváček estas vicprezidanto de IKUE, ing. J. Kalný estrarano de IKUE, ing. Z. Kotíková, J. Kořístková kaj B. Horáčková estraraninoj de la junularo (IKUEJ). La sekcio ankaŭ organizas korespondajn kursojn (Z. Novotná, H. Nováková). La 55-a kongreso de IKUE okazos julie 2002 en Kroměříž.

*(laŭ M. Šváček)*

## Infanoj el Okříšky korespondas kun Japanio

La Esperanto-rondeto de la elementa lernejo en Okříšky (apud Třebíč) gvidata de Kamila Bártlová, korespondas kun infanoj el Brazilo, Kanado kaj eĉ el Japanio. La kulturministro skribis al ilian subtenon (laŭ junia informo en la moravia ĵurnalo Rovnost).

## AL LINGVA DEMOKRATIO!

ALVOKO AL LA MEMBROJ DE  
UEA/TEJO/ILEI

Karaj membroj (kaj ne-membroj) de  
UEA/TEJO/ILEI,

dum la Universala Kongreso en Zagrebo  
la komitato de UEA aprobis novan  
labor-planon kaj komisiis nin esti speco  
de "garantia komisiono", kiu certigos, ke  
la labor-plano estos kunlabore plenumata  
de la membroj de niaj tri organizaĵoj.

La nova labor-plano emfazas la jenajn  
prioritatojn:

- \* informado
- \* instruado
- \* utiligado
- \* plijuniĝo
- \* tutmondiĝo
- \* profesiigo

Ili estas en si mem klaraj, kaj vi povas  
detale legi en la labor-plano mem, kiel ili  
estas komprenataj.

Ĉu ni bezonis novan labor-planon  
komence de la 3-a jarmilo? La respondo  
estas, laŭ ni, jes! Sekve de tio, kion ni ĉiuj  
faris sub la flago de la "Kampanjo 2000",  
ni nun devas turni nian atenton al la stato  
de Esperanto en la mondo, kaj reigi  
movado, kiu parolas al la mondo, en  
maniero, kiun la mondo komprenas  
(informado), kiu instruas la lingvon kaj la  
movadon ankaŭ per la lastaj metodoj kaj

teĥnikaj rimedoj (instruado), kiu utiligas  
Esperanton por la normalaj bezonoj de la  
vivo (utiligado).

Tiaj agadoj estu farataj kun atento al la  
junularo, esperantista kaj neesperantista, al  
la tumonda dimensio de nia agado (por ke  
ne restu landoj sen esperantistoj) kaj al la  
uzado de la profesiaj talentoj de niaj  
membroj.

Unu lasta afero devas esti klara al ĉiuj:  
ni ne bezonas konkurenci kaj batali inter  
ni. Ni estas ĉiuj laborantoj por la sama  
idealo preter kelkfoje tro rigidaj asociaj  
limoj. La labor-plano, kiun vi legos,  
emfazas la rolon kaj de UEA kaj de TEJO  
kaj de ILEI, kaj de ĉiuj aliaj esperantistaj  
asocioj, kaj ni ŝatus en ĉiuj landoj vidi  
kunlaboron, eĉ se kun la bezonata mem-  
stareco de ĉiu organizaĵo.

Ankaŭ la titolo de ĉi tiu komunikado kaj  
de la laborplano "Al lingva demokratio!"  
ne bezonas klarigon. Ĝi tre klare diras, kiu  
estas la finfina celo de nia laboro.

Ni faros nian komunan eblon por helpi  
vin kaj ni dankas vin pro viaj estontaj  
klopodoj.

*Renato Corsetti, prezidanto de UEA*  
*Holger Boos, prezidanto de TEJO*  
*Mauro La Torre, prezidanto de ILEI*  
*Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA*

PS. Ekzempleroj de la laborplano estas  
haveblaj ĉe: Renato Corsetti, Via del  
Castello, 1,  
IT-00036 Palestrina, Italujo,  
<renato.corsetti@esperanto.org>

---

Zdenka Bergrová

## Vánoční 2001

Kdo věří jako ten, kdo nevěří,  
má na Vánocích podíl.  
Ať nezůstanou chudí u dveří,  
k nim aby pámbu chodil.

Je hodně lumpů, daří se jim krást,  
ubíjet, rvát a dávit,  
je hodně vrahů na tak malou vlast,  
proplují každý závit.

Tyhle ať klepne pámbu palicí,  
obhájí udeptané.  
V Čechách je nevěřící věřící,  
že se to jednou stane.

Řetízky vloček, vloček vánočních  
lesu ať pámbu natká,  
jen za okny ať poletuje sněh  
a zábne jinovatka.

Ať nezůstane národ u dveří  
a děti přijdou na svět  
zdravé a hebounké jak pápěří  
láskou tu domov stavět.



Zdenka Bergrová

## Kristnaska 2001

Kiu kredas same kiel nekredanto,  
pri Kristnasko havas meriton.  
Malriĉuloj ne restu sur verando,  
Eternulo ne ŝparu ĉe ili viziton.

Abundas kanajloj, sukcese ili ŝtelas,  
scias mortigi kaj strangoli,  
en tiom eta patrujo murdistoj troas,  
kapablaj ĉien sin trabori.

Tiujn la Disinjoro klabofrapi pretas,  
sed suferantojn li defendos.  
En Bohemio eĉ nekredanto kredas,  
ke tiun miraklon Li sendos.

Ĉenojn da neĝeroj, Kristnaskajn flokojn  
teksu Di-mastro por la arbaro,  
post fenestroj kirliĝu neĝo en blokoj  
kaj glaciigu prujna vualo.

Ne restu la nacio staranta ĉe la pordo  
kaj infanoj venu en la mondon  
sanaj kaj lanuge veluraj en akordo  
per amo konstrui hejman rondon.

*(Tr. M. Malovec)*

**Gajan Kristnaskon kaj  
Feliĉan Novan Jaron al  
ĉiuj niaj gesamideanoj  
deziras**

*Komitato de ĈEA*



## Prelegoj pri Ĉeĥa respubliko en Francio

Antaŭ du jaroj invitis min Esperantistoj el Bretonio (la plej okcidenta parto de Francio) por alproksimigi al Bretonanoj (ne nur al Esperantistoj) belecojn de nia lando. Niaj landoj reciproke ne estas ofte vizitataj pro malproksimeco. Miaj prelegoj kun diapozitivaj havis ankaŭ alian gravan taskon: montri, ke Esperanto estas kapabla kaj praktika lingvo. Prelegoj sukcesis. Nunjare ni ricevis kun mia edzino denove inviton por informi civitanojn de Bretonio pri riĉa historio de nia lando, pri kutimoj, pri sukcesoj kaj malsukcesoj de E-movado en nia urbo Česká Třebová kaj en nia lando, pri E-parto de muzeo en Česká Třebová ktp.

Prelegoj kaj renkontiĝoj okazis en sekvaj lokoj: Nancy, Thionville, Le Mans, Gressillon, Vannes, Hennebont, Lorient, Quimper, Saint Brioux, Daoulas, Plouezek, Saint Malo.

Prelegoj estis publikaj kun spertaj interpretistoj el Esperanto al franca lingvo. Ni prelegis ankaŭ en lernejo, en instituto por handikapuloj. Interesaj renkontiĝoj okazis en E-klubo. Ĉiam dum prelego aŭ post prelego sekvis amaso da demandoj el diversaj fakoj. El kelkaj lokoj mi ricevis antaŭe informojn. pri kiuj temoj aŭskultantoj interesiĝos. Ekzemple geaŭskultantoj en la urbo Thionville, (apartamento Lorino), volis ricevi informojn pri sindikata movado inter gefervojistaro en nia lando. Mi

sukcesis respondi ĉiujn demandojn dank' al funkciuloj - sindikatanoj en stacidomo de Ĉeĥaj fervojoj en nia urbo. Multajn demandojn mi ricevadis el historio de nia lando, pri rilatoj de Ĉeĥoj ka Slovakoj dum pasinteco kaj nun. Mia edzino parolis pri kuirado en nia lando kpt. Dufoje mi ricevis postulon: kantu ĉeĥan himnon. Mi kantis, sed en animo mi petis miajn eksinstruistojn de kantado pardonon....

En E-klubo mi parolis pri problemoj en nia E-grupo, en E-movado. Ambaŭflanke ni interkonsentis, ke mankas al E-movado junularo. Mi parolis pri aktiveco de E-klubo en Česká Třebová (E-baloj, regulaj renkontiĝoj kun E-grupoj el najbaraj urboj), pri E-parto de Urba muzeo, kiu enhavas pli ol 6.500 librojn,

multajn gazetojn kaj diversajn dokumentojn el agado de Esperanto en nia lando. Ni konatiĝis kun aktiveco de Bretona E-asocio. Sur la pinto de aktiveco nepre staras 18-ana "Bretona E-koruso", kiu eldonis CD (KDo) kun nomo "MEVEN". CD enhavas kantojn el Bretonio tradukitajn en Esperanton de anoj de la koruso. Entute ni realigis pli ol 22 prelegojn kaj renkontiĝojn en E-klubo. Multaj renkontiĝoj kun E-unuopuloj, E-familioj, interesaj ekskursoj al ĉarmaj lokoj de Atlantika marbordo plenumis nian tempon en Francio (Bretonio) Oferemeco de francaj E-geamikoj estis admirinda kaj neforgesebla. Laŭ artikoloj en francaj gazetoj kaj informoj de geesperantistoj la prelegoj plenumis sian taskon.

*Jiří Pištora*

## Kunveno de najbaraj E-rondetoj en Lanškroun

E-rondeto de Lanškroun preparis por anaro de najbaraj E-rondetoj interesan programon la 24-an de novembro 2001. Malgraŭ malbona vetero kunvenis pli ol 30 personoj el naŭ diversaj lokoj.

Komune ni vizitis Integritan Mezlernejon kaj Faklernejon por frizistoj, kosmetikistoj kaj librobindistoj. Ni vidis laborejon por kosmetikistinoj kaj aŭdis pri ilia preparo por laboro de ilia instruistino. Ŝi eĉ konsilis al esperantistinoj, kiel zorgi pri siaj vizaĝoj kaj manoj. Ŝi sciigis nin pri ebleco uzi frizistan salonon de geleernantoj, kiun ni vidis. Ni vidis ankaŭ tion, kion faris junaj librobindistoj lernantaj manlaboron en sia fako. Iliaj fabrikaĵoj al ni tre plaĉis, multaj el ni volis ion aĉeti.

Poste ni vizitis modernan presejon A6, kie oni sabate laboris, do, ni povis vidi maŝinojn en movo. Mi admiris precipe aŭtojn pri folkloraj festivaloj kaj bildkartojn kun homoj kaj teknikon de fabrikado. Ni donace ricevis bildkartojn.

Post tagmanĝo en restoracio lokaj esperantistoj tie gastigis nin per farunaĵoj. Ni aŭdis sciigojn el E-rondetoj kaj ĝojigis nin premioj el tombolo. Lastan programeron preparis inĝeniero Z. Polák. Li rakontis pri Malbork.

*Zdenka Novotná*

## Gajnis premion kaj alveturis ...

E-grupo en Česká Třebová bonvenigis gajninton de premio el letervespero, kiu okazis fine de pasinta jaro. Ŝi gajnis unusemajnan senpagan restadon en nia urbo.

Josette Ducloyae el urbo Quimper (Francio) kaj ŝian edzon bonvenigis anoj de E-grupo kaj ebligis al ili dum semajna restado ekkoni vivon en E-familioj kaj plue preparis por ili riĉan programon. Gastoj el Francio vizitis muzeon en Česká Třebová, urbojn Dobruška, Opočno, Litomyšl, Polička, kastelojn Bouzov kaj Nové Město nad Metují, skanzenon "Vysočina" proksime de Hlinsko, Slavkov kaj pluajn lokojn. Vesperoj dediĉitaj al diskutado pri komunaj intereso kaj ankaŭ al amuzo alternis kun renkontiĝoj kun geamikoj el Nederlando, kiuj tiutempe vizitis nian urbon kaj kun instruisto el Japanujo, kiu vizitis sian amikon en Litomyšl. Kun geamikoj el Litomyšl kaj Žamberk ni kun E-gastoj renkontiĝis en la bela naturmedio "Mandl" ĉe tendofajro. Ni babilis, kantis kaj aŭskultis interesaĵojn rakontitajn de eksterlandaj gastoj.

*ekct*



## **Bretona Esperanto - Koruso KDo "MEVEN" (eldono: junio 2001)**

La KDo "MEVEN" enhavas 8 bretonajn kantojn, esperanten adaptitajn kaj interpretajn de la Bretona Esperanto-Koruso.

Bretonio estas plej okcidenta regiono de Francio kun historio marista kaj kamparana: ĝia kelta-devena lingvo, preskaŭ mortinta, nun viglas dank' al volo de la bretonoj mem.

La Bretona Esperanto-Koruso, de sia naskiĝo en 1966, maturiĝis kaj kreskis: ĝi arigas nun dudekon da esperantistaj korusanoj, ĉiuj amatoraj, kelkaj estas komencantoj, aliaj pli spertas kaj kapablas kanti soliste, neniuj ĝis nun spertis registradon.

"MEVEN" estas rezulto de 8-monata laboro, po duhora ekzercado monate, do oni ne serĉu en ĝi perfektecon, sed spiriton kaj identecon de breton-muzika kulturo, tra korusanoj, kiuj amas sian Bretonion, kaj dediĉis sian tutan energion kaj bonvolemon al tiu projekto.

"MEVEN" bonodoras Bretonion.

La koruson estras Franjo Provost, profesia korusestrino, kiu akiris sian sperton tra dudek-jara korusestrado, en plej divers-stila repertuaro, de klasikaj verkoj kun orkestra akompano ĝis nunaj verkoj, tra gospeloj, ĵazo kaj varieteo, ŝi trejniĝis al orkestra estrado ĉe Wolfgang BADUN kaj al korusa estrado ĉe plej famaj francaj pedagogoj, t.e. Philippe CAILLARD kaj Stephane CAILLAT,

dank' al ŝia muzika interpretado kaj al originaleco de ŝiaj projektoj, la korusoj, kiujn ŝi estris, transpaŝis la limojn de Bretonio. Kiam ŝi renkontis Esperanton, ŝi malkovris en ĝi novan ispirofonton sur kultura kaj muzika kampoj.

La repertuaro de "MEVEN" spegulas ĉiujn aspektojn de bretona muzika kulturo, kelkaj kantoj ankras ĝin, aliaj folkloraj montras regulan ritmon necesan al dancado, kiujn ili plej ofte celas, ilin oni aŭdas en la tradiciaj "fest-noz" (breton - lingve: noktofestoj), kaj fine lastaj apartiĝas pro siaj tekstaj kaj voĉaj esprimoj - inter realeco kaj legendo - kaj pro koloro nomata "modala muziko", kie agordo ne plu respondas al klasika harmonio, sed fontas en keltaj melodioj.

Ĉiuj kantoj estis adaptitaj esperanten okaze de tiu projekto: la libreto entenas la tekstojn en la franca (krom unu en la bretona) kaj en esperanto, ankaŭ en tio oni povas certigi, ke esperanto plenumis sian celon utili inter - kultura ponto.

La korusanojn akompanas en tiu KDo muzikiloj, kelkaj tipe bretonaj, la muzikistojn, amatorajn aŭ profesiajn allogis originaleco de la projekto, ili entuziasme kunlaboris.

"MEVEN" naskiĝis ..., vento plu blovas en veloj de la Bretona Esperanto-Koruso! Ĉu ni denove rompos la kaj-ŝnurojn? sed ĉi-foje por forlasi Bretonion kaj ondumi je ritmo de "maristaj kantoj de la mondo", transiri oceanojn, kaj halti en havenoj ĉie en la mondo? ---

*RET-Info*



## Esperanta PEN-Centro dekjara

Perla Martinelli, Istvan Nemere kaj Giorgio Silfer fondis la Esperantan PEN-Centron la 27an de novembro 1991. PEN Club International akceptis la novan centron dum sia mondkongreso en Santiago de Kampustelo la 10-an de septembro 1993. Temas pri la plej grava agnosko pri Esperanto kiel literatura lingvo ĝis nun atingita.

La dekan datrevenon oni honoris diversloke, interalie en Bulgario (Razgrado kaj Varno) kaj en Svislando, kie estas la jura sidejo de la Esperanta PEN, kies nuna prezidanto estas William Auld.

Sed la plej grava omaĝo al la eta jubileo estas la aperigo de la E-traduko de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj, la dokumento proklamita en Barcelono la 6an de junio 1996, kunverkita kaj subskribita ankaŭ de niaj profesiaj E-verkistoj.

La organo de la Esperanta PEN estas la prestiĝa kaj altkvalita revuo "Litera-tura Foiro".

Danke al PEN, nia lingvo ĉeestis kiel oficiala gasto en la unua itala Literaturfestivalo en Mantua (septembro 1996). Tiukaze ni lanĉis projekton de Verkista Domo en la bela renesanca urbo Sabloneto. La klopodo bedaŭrinde ne realiĝis.

En 1997 la centro kunvokis, kun E-Radikala Asocio, la unuan Forumon por la Esperanta Civito (Chaufono, aŭgusto 1998). El tio evoluis la projekto

de Karolovaro (1999), ĝis la Ĉarto de Sabloneto. Laŭ iniciato de nia membro Manuel de Seabra, la Esperanta PEN, kun EVA kaj IEMW, kandidatigis William Auld en 1998 por la literatura Nobel-premio, kun rimarkinda eĥo en la amasmediaj komunikiloj.

Financan subtenon ni ricevis ĝis nun de LF-koop, Pro Helvetia, Mantua Literaturfestivalo kaj privatuloj.

Ĉe LF-koop kaj la plej bonaj libroservoj estas mendebla la eleganta broŝuro en esperanto kun la teksto de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj, prefaco de Daniele Vitali, postparolo de Giorgio Silfer. La broŝuro estas tre utila ankaŭ por enfokusigi plurajn konceptojn pri lingvo kaj lingva minoritato, kies signifojn la esperantistoj ne ĉiam adekvate konas.

*Laŭ Heroldo komunikas*

## Muziko el Brazilo

### Ni dancu en la rondo

estas kompakta disko kun ĉarmegaj infankanzonoj, kiuj plenigis per ĝojo milionojn da brazilaj infanoj, nun haveblas en la internacia lingvo. Kantas F. Fonseca (kiu koncertis en UK Prago 1996) kaj C. Pancieri. Tre taŭga por bazaj esperanto-kursoj.

### Merlin

estas brazila muzikbando de kvin junuloj, kies kantoj aperis en Esperanto kaj furoras en Esperantujo sur kompakta disko **Ho mia kor'**. Estas tie ankaŭ muzikaĵoj sen tekstoj.

## ĈAMBRO EN LA VIRTUALA LERNEJO: LA PROVERBEJO

En la interreta virtuala lernejo "TIBOR SEKELJ" funkcias metiejo, nomata "PROVERBEJO". Tie la kunlaborantaj lernejoj klasoj el diversaj landoj povas kompari siajn proverbojn kaj diraĵojn, helpe de diversaj rimedoj kaj utilaĵoj.

En la PROVERBEJA ĉambro disponblas diversaj anguloj:

- AGADOJ, kie la lernantoj trovas sugestojn pri lernigaj agadoj por proverba esplorado;

- PROVERBAROJ, kolektoj da esperantaj kaj etnolingvaj diraĵoj, rete atingeblaj aŭ libroforme ekzistantaj;

- LEGAĴOJ, t.e. kelkaj legindaj verkoj pri tiu laborkampo;

- ampleksaj priproverbaj bibliografioj (ESEJOJ);

- ligo al proverbfakaj internaciaj REVUOJ;

- esplorindaj TERMINOJ utilaj por pritrakti la diversspecajn diraĵojn (popoldiroj, sentencoj, devizoj, citaĵoj, kliŝaĵoj, figuraj esprimmanieroj, ktp.).

Ĉefa celo de la PROVERBEJO estas malkovri kiel en la diversaj tradicioj - tra generacioj kaj jarcentoj - oni koncize kaj kliŝe esprimis siajn bazajn scierojn.

Por viziti la PROVERBEJON la retumantoj, devos eniri la kvazaŭlernejon "Tibor Sekelj" ĉe

<http://ips.uniroma3.it/kler>.

En la halo oni trovos la ĉambraron Fakaj

Metiejoj, ...

## Kontakto

Kiel eble vi jam scias, Kontakto (la junulara gazeto, organo de TEJO) havos ekde 2002 novan redaktoron, Eugenia (Ĵenja) Zvereva el Kievo, Ukrainio. La retadreso de Kontakto restos la sama, <kontakto@esperanto.org>. Post du semajnoj la retadreso transiros al Ĵenja. La poŝta adreso de Kontakto estas ekde tuj: Kontakto, p/k 89, UA-01030 Kiev-30, Ukrainio

Mi kore dankas pro via kunlaboro kaj subteno al Kontakto dum mia redaktoreco. Multan sukceson en via agado kaj frukto-donan pluan kunlaboron kun Kontakto!

Amike salutas,

*Dr. Sabira Sta'hlberg*

## SAT kongresos en Svislando

La lasta kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda aprobis la inviton okazigi la SAT-kongreson 2003 en Chaufefono.

Kvankam la urbo situas en Svislando, ĝiaj prezoj estas praktike francaj. Cetere, eblos eĉ tranokti en Francio kaj atingi aŭte aŭ trajne Chaufefonon per dudekminuta veturado maksimume.

La programo proponos, apud la kutima prioritata tagordo, pli da kulturaj kaj distraj programeroj ol kutime. SAT-informtago por la interesuloj loĝantaj en Svislando estas planata por la venonta printempo.

## Sekcio de Informadiko

Gvidadon de la sekcio akceptis ing. Josef Vojáček, Sochorova 13, 682 01 Vyškov, [vojacek@iumbo.ped.muni.cz](mailto:vojacek@iumbo.ped.muni.cz).

La sekcio celas helpi al esperantistoj, kiuj batalas kun komputiloj en sia por-esperanta laboro, bezonas helpon ĉe interreto, serĉas kunlaborantojn por siaj aktivecoj, interesiĝas pri informoj ktp.



Ĉe interreto estis kreitaj paĝoj prezentantaj laboron de nia asocio, kaj ankaŭ de niaj poetoj (Kožík, Bergrová, Ludíková, Karen, Rumler, Vidman k.a.) kaj terminologoj (Traxler, Werner, Kavka), kvankam kelkaj el ili eĉ ne posedas komputilon. Rete estas atingebla elektronika versio de niaj gazetoj Starto kaj Dio benu (precipe por bezono de nevidantoj) kaj kelkaj kluboj sukcesis en la reto prezenti sian laboron aŭ sian urbon. Enkomputiligitaj estis multaj beletraĵoj kaj fakaj verkoj el heredaĵo de elstaraj karmemoraj esperantistoj kaj kompreneble eblas multajn laborojn daŭrigi aŭ startigi.

La modernaj rimedoj de komunikado donas al nia movado grandajn ŝancojn disvolvi la lingvon, ĝian kulturon kaj disvastigi kaj junigi ĝian membrobazon. Ĉio dependas de aktiveco de ni ĉiuj kaj la sekcio de informadiko povas esti renkontejo de tiuj agadoj.

## Prezentu vian urbon

Ni ĉiuj ofte cerbumas, kiel prui al la neesperantista publiko, ke la internacia lingvo povas esti utila ankaŭ al ili, eĉ se ili mem ne scias ĝin. Bonan ekzemplon montris al ni samideanoj el Most, kiuj esperantigis informojn pri historiaj kaj turisme interesaj vidindaĵoj de sia urbo kaj publikigis la tradukon en la reto. Jam estis komencita tradukado de informoj pri Brno kaj Litomyšl, kiuj povus fariĝi bazo de esperantlingva reta paĝo pri ĉeĥaj urboj, ilia historio kaj vidindaĵoj. Poste aperados ĉiam novaj kaj novaj urboj. Se la samon faros ankaŭ esperantistoj en aliaj landoj, povas en la interreto kreski sistemo de esperantlingvaj turismaj informoj pri la tuta mondo.

La Litomišla magistrato miras, ke eksterlandaj esperantistoj konas ilian urbon el la verkoj de K. Piĉ (*La Litomišla tombejo, Ordeno de la verkistoj*) - similan impreson povas fari niaj interretaj paĝoj pri ĉeĥaj urboj. Pri multaj jam aperis paperaj flugfolioj, sed tiuj ne ĉiam atingas turistojn kaj perdiĝas en skatoloj kun malnovaj esperantaĵoj. Male la interreta prezentado estos ĉiam helpopreta por turistoj celantaj nian landon.

La tekstojn pri la urboj ni atendas de vi (eĉ de tiuj, kiuj ne posedas komputilon). Bonvolu sendi al ni la historion, legendojn kaj vidindaĵojn de via urbo (el vidpunkto de tipa eksterlanda turistoesperantisto), ni redaktos ĉion kaj publikigos.

La tekstojn sendu al la redaktoro de Starto.



## Jan Filip

(9.12.1911-21.11.1971)

Duoblan daterevenon de la katolika pastro, kiu (kune kun sia pli juna frato Karel, ankaŭ pastro) al nia movado donacis *Grandan Esperantan-Ĉeĥan kaj Grandan Ĉeĥan-Esperantan* vortarojn, memorigis per la ampleksa artikolo *Dio benu 4/2001*. La fratoj faris la vortaron ankoraŭ kiel adoleskantaj knaboj. La Esperantan literaturon ili riĉigis ankaŭ per kantareto de naciaj kantoj kaj per originalaj dramoj *La turo inter nuboj* kaj *Fino de la mondo*.

## LA DOMO de TAKE

Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE) eldonas organon LA DOMO, en kiu estas publikigataj komercaj reklamoj ankaŭ de neesperantistaj entreprenoj. Neesperantistaj dubantoj miras pro la multnombraj komercaj leteroj, faksoj kaj ret-mesaĝoj en Esperanto. Tial faktoj sukcesas persvadi per si mem sen fanfarona propagando.

## Hranice - Voorburg.

La ĵurnalo *Nové Přerovsko* informis 7.9.2001 pri ekskurso de esperantistaj komencantoj el Hranice al la partnera nederlanda urbo Voorburg. La kurson en Hranice sub gvido de Alois Jakubec komencis 15 kursanoj, finis 9. La gastojn akceptis iniciatinto de la aranĝo Marjet Erasmus. La esperantistoj el Voorburg donacis al la urbodomo en Hranice 200 tulipajn bulbojn de kulturvario Esperanto.

## I.T.R.E.

Internacia Tradukreto pere de Esperanto <http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/ret/itre.htm> proponas tradukadon inter 31 naciaj lingvoj per 69 tradukantoj. Tradukanto A tradukas de sia denaska lingvo al Esperanto, tradukanto B tradukas de Esperanto al sia denaska lingvo. El ekster-eŭropaj lingvoj aperas la araba, ĉina, japana, persa, suahila, uzbeka. En la slovakon tradukas Stano Marček, la ĉeĥa estas metita en krampojn kun rimarko, ke enĉehigon de mallongaj tekstoj povas prizorgi la kunordiganto.

## Paroliga kurso Asocia ekzameno

Ĉi tiu kurso (parol-iga, ne paro-liga) okazas en Olomouc ĝuste nun, kiam mi finas redaktadon de ĉi tiu numero de Starto. La kursojn gvidas Jana Melichárková kaj Věra Podhradská, aliĝis kelkdek personoj. La printempa kurso en Česká Třebová kun asociaj ekzamenoj tre plaĉis kaj sendube plaĉos ankaŭ la kurso en Olomouc. Printempe la pedagogia sekcio planas pluan kurson denove kun la asociaj ekzamenoj. Interesatoj povas aliĝi ĉe Mgr. Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice,

[melicharkova@quick.cz](mailto:melicharkova@quick.cz)

## Esperanto en tramoj

En 12 tramoj kaj trolebusoj en Brno dum decembro 2001 veturas aŭtoŝoj A4 memorigantaj la 100 jarojn de Esperanto en la urbo. Por la reklamo pagis la klubo 900 Kč.

## HOFFMANN EN ESPERANTO

Ruslanda eldonejo "Sezonoj" en la jaro de la 225-a naskiĝdatreveno de Ernst Theodor Amadeus HOFFMANN eldonis lian novelon "Konsilisto Krespel", ("Rath Krespel" en la germana). Ĝi estas unu el la eroj de la populara novelaro de Hoffmann "Serapiona frataro". La 24-paĝan novelon tradukis el la germana lingvo Wolfgang Kirschstein kaj ricevos ĝin kiel literaturan suplementon ĉiuj abonantoj de la revuo "La Ondo de Esperanto" (Kaliningrad, Ruslando).

La Esperanta traduko de la novelo, priskribanta la vivhistorion de la mania muzikisto kaj ties filino, estas eldonita en la naskiĝurbo de Hoffmann Koenigsberg/Kaliningrad kiel la unua libro, kiun "Sezonoj" eldonis post la transloĝiĝo el Uralo al Baltio.

### En Londona klubo

Mi vojaĝis al Londono kun hospitala sindikata ekskurso kaj tiel okazis eblo viziti kunvenon de la loka E-klubo. En la klubo mi estis varme akceptita kaj mi povis prelegi kaj prezenti nian landon kaj urbon per nia videobendo. La diskuto estis vigla kaj mi estis surprizita, kiel multe da britoj vizitis Ĉeĥion kaj sciis multe pri nia lando. Ili demandis ankaŭ pri Slovakio. La Londona klubo kunvenas vespere en ĉiu vendredo en domo, kiun pagas por neprofitaj organizoj la urbofiko en strato Drummond. La ekipaĵo estas simpla: multaj seĝoj, televido kun

video, tabulo, tabloj. Oni povas tie kuiri teon kaj kafon kaj prepari simplan manĝon. Bedaŭrinde, la vizito estis mallonga. Restis ankoraŭ multe por demandoj.

Laŭ brita kutimo ni tranoktis dufoje en privataj loĝejoj, kie ni vesper- kaj matenmaĝis. Tiuj hoteletoj estas la plej malmultekostaj. Ili estas en ĉirkaŭurbo kaj gastigantoj ricevas gastojn de agentejo. Ankaŭ tio estas tre interesa parto de ekskurso. Propraokule vi povas rigardi familian vivon, sperti ordinarajn britajn manĝaĵojn kaj iomete strangan anglan konduton. Mi povus rakonti pri londona nebulo, pri reĝaj juveloj kaj kronoj, pri Tower kaj Windsor, pri Trafalgar kaj Piccadily, pri Nacia Galerio, pri muzeo de vaksaj figuroj, pri malkoloraj plej parte malhelaj vestaĵoj de virinoj, pri plenŝtopitaj stratoj, pri malpura rivero, pri parkoj, pri mezlernejo en Eton, kie lernas princo Henry kaj kie estas pordego tre kaduka kaj pri Griniĉo... sed nur impresoj pri la Eŭro-tunelo meritas publikigon.

Ni vojaĝis per ĉeĥa aŭtobuso. La areo antaŭ la tunela enirejo estis vastega kaj tute malplena. Ni estis frue matene ununuraj intersiĝantoj por eniri. Semaforo ĝvidis nian aŭtobuson en trajnegon. La vagono fermiĝis kaj ni sidis en la buso atendante ekmoviĝon. Ŝajne nenio okazis, sed post dudek minutoj kelkaj homoj elbusiĝis kaj tra fenestroj vidis, ke ni veturas fulmorapide. Antaŭ ol ni sukcesis spekti en la buso videobendon pri konstruo de la tunelo, ni jam traveturis ĝin.

*Jindřiška Drahotová*

## Lingvaj ludoj kaj enigmoj

### 8

Solvoj de la retrolegoj el la antaŭa numero:

13. Bank', knab'

14. Renomaro, ore moner'

Estas konate, ke en Esperanto ni kreas multajn novajn vortojn helpe de afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj), kiuj havas pli malpli precizan difinon. Sed ekzistas Esperantaj vortoj, kiuj aspektas, kvazaŭ ili havus tian afikson, sed tiu ĉi afikso estas nur ŝajna, ĉar ĝi estas konsistaĵo de la vorta radiko. Ekzemple:

Kalkulo ne estas ulo de Kalko.

Salono ne estas ono de salo.

Mistero ne estas mis-tero.

Pralino ne estas pra-lino.

La enigmo bazita sur tiu ĉi fenomeno povas esti nomata

### PSEŬDOAFIKSO

Ni proponas vortojn aŭ vortgrupojn kun tiaj ĉi kvazaŭafiksoj al divenontoj kiel demandoj aŭ konstatojn, en kiuj la formoj sen ĝi kaj kun ĝi estas okulfrape signitaj per sinonimoj aŭ preskaŭ-sinonimoj. La falsafikso povas esti suflorita aŭ ne. Ekzemple:

Jen fraccio de MARĈPLANTO

kun la trunko kava  
estas taŭga PAFILEGO

por armeo brava.

*Solvo: kano, kanono.*

Estas skribaĵo blankkalka sur klasa  
tabulo

tute ne delikata pri amo de ŝi kaj ulo.

*Solvo: kreta, diskreta*

Salonego sen superfluaĵo

estas tre modesta

preta por la dancamuza maniero

tute ne majesta.

*Solvo: balasto, bala stilo*

Kaj nun divenu jenajn pseŭdoafiksojn:

15. Ĉu vi scias, kiel parto

de granda pasio

transformiĝas al metodo

ĉe la profesio?

16. Malmoleta elemento kun fiks-aldono

iĝos la grupet' kapabla por muzik-

salono.

*Josef Cink*

### Korektu jenajn frazojn:

1. Fotado per pioĉo estas laciga laboro.

2. Peru bovinojn hejmen.

3. En Prago koncentriĝis mutaj fabrikoj.

4. Ĉe la maldekstra planko de la muro estas via biciklo.

5. Glutoj faras maron.

6. Karlo ŝmiras vundon per plasto.

*Jaroslav David*

1 fosado, 2 pelu, 3 multaj, 4 flanko, 5 gutoj, 6 plastro



## Nia filmo



1. La ĉeĥa fervojista delegacio plantas en la parko Esperanto en Malbork la ĉeĥan naciaĵon arbon - tilion (22.9.2001)

2. La partoprenintoj de la 90-jariĝo de EK Olomouc la 29-an de septembro 2001

3. Ĉu multaj E-kluboj zorgas pri simile granda propaganda E-ŝranko kiel en Pardubice?

4. Okaze de 45-jariĝo de EK Znojmo aperis ankaŭ insigno

## Anoncetoj

- Mankas al mi jenaj ekzempleroj de gazetoj: El popola Ĉinio 5/1994, Monato 7/1997, Esperantisto Slovaka 6/1991. Ĉu iu povas helpi min? Gustav Heczko, J. Maluchy 126/7, 700 30 Ostrava-Dubina

- Mi deziras korespondi ku E-organizoj kaj esperantistoj-kolektantoj. Mi kolektas kaj interŝanĝas filatelaĵojn, monerojn, loterbiletojn, telefonmarkojn, enirbiletojn k.a. Adreso: Dijichang 10-Chejiang, Haebin 150040, Heilongjiang, Ĉinio, <http://www.hl.cninfo.net>

## 79-a Germana Esperanto-Kongreso

okazos (17.-20.5.2002) en Husum, urbo de Theodor Storm. Organizanto: Christian Darbellay, Kaiserstr. 39, DE-24143 Kiel, tel. DE-0431/737788, [79.GEK@web.de](mailto:79.GEK@web.de)

## Starto 2001

**Starto 1/2001** (198): Svazová adresa, Internetové adresy, Nová služba svazu, Další informace o autokarovém zájezdu na UK do Záhřebu, Skokovy printempe, Perpaca armilo en nova jarmilo, Ekspozicio en Vyškov, Esperanto-Silvestro en Česká Třebová, Paroliga kurso + Asociaj ekzamenoj, Sto let esperanta v Brně, Polička, Esperanto kaj turismo, Mia veturado en Hungario, JAZAF 2000 en Leipzig, Nia filmo, Zpráva o činnosti Městského muzea v České Třebové, Abonoj de gazetoj, Jarraporto de pri aktivado de EK Ústí n.L., 18-a Ĉeĥa-Saksa tago, IRDEN Plavy, Klerigaj kaj turistikaj tagoj, Rekorda aliĝo de dumvivaj membroj de UEA en 2000, Yumeiho - japana kuracmetodo, Granda publika atento al la UK en Zagrebo, Oratora konkurso por junularo relanĉota, Koresponda servo, Literatura konkurso EKKRA, Julius Zeyer, Ministeria alvoko, Nabídka zboží, Esperantista balo en Česká Třebová, Most - unuaj oficialaj TTT-paĝoj en Esperanto, Iom da humuro, Telegrafe el la mondo, Kelkaj inspiroj por la Eŭropa Jaro de Lingvoj, Kvin novaj E-bildkartoj, Esperanto-arbo en Znojmo, 45jaroj de EK Znojmo, Internacia ekspozicio "De koro al koro", SCI-FI, Esperanto en Lublina Politekniko, Entrepreno uzas Esperanton, Orienta politiko de Vatikano, Ni kondolencas (Pastro Giacinto Jacobitti, Milada Hemerková, Jan Blažek, Jaroslav Lysý), Honoraj prezidantoj en Olomouc, Aŭtoraj rajtoj de Karolo Přf, Lernolibro

por kuracistoj kaj biologoj propagandas Esperanton, Lingvaj ludoj kaj enigmoj 5, Ĉeĥa poŝto denove propagandas Esperanton, Kalendaro 2001, Plua E. filatela sukceso.

**Starto 2/2001** (199): Eŭropa Jaro de Lingvoj, 14-a Internacia kultura festivalo, 49-a Esperanto-Tendaro en Lančov, Sebranice, Nekvasovy 2001, 2-a E-Mental', Se vi povas, helpu!, La Granda Vortaro Esperanto-Germana, Ekspozicio kun konkurso de infandesegnaĵoj el la tuta mondo, Kie estas Zamenhof-portreto de Havlas? EK Olomouc 90-jara, Ostrava-Poruba, Bapto de bildkartoj en Ostrava, Freŝa 80-jarulo (Josef Xaver Kobza), Nova kalendaro de EK Přerov, Unua esperantlingva aŭdo-CD en Ĉeĥio, Societo K. H. Mácha kaj Esperanto, 53-a IFEF-kongreso ĉe Ĉeĥa poŝto, Najado de A. Dvořák en Esperanto, EK Strážnice, Cent jaroj de KE Brno, EK Znojmo, Ĉeĥa Poŝto en Strážnice, Ni kondolencas (Marie Deisznerová, Evžen Belda), Korektu pri KE Přerov, "Adonido" Ratíškovice, 13-a seminario de AEH en Skokovy, La 53-a IFEF kongreso en Tábor, Jubileo de EK Poděbrady, 37-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, Pozvánka na 8. konferenci ĈES Poděbrady, Alvoko al filatelistoj, Kunlaboro OSIEK-ĈEA, Pasporta Servo 2001, UEA kandidatigita por la pacpremio de Nobel, 18-a Internacia Festivalo en Magdeburg, Lingvaj ludoj kaj enigmoj 6, Solvu el du vortoj inter citiloj, Alvoko por renovigi la Esperantistan pacmovadon, Kultura semajno en Togolanda lernejo, Esperanto-Domo en Havano, Autokarový zájezd do Záhřebu 20.-29.7.2001, UMEA-

kongreso en Kroatio, Himalaja renkontiĝo, 18-a somerkursaro de Esperanto, Infanoj el Okříšky, Nova studo de Claude Piron, eLibrejo, Biblioteko de Don Harlow, Brusela oficejo, Alvoko: Ni konstruu!, Gloraj verkoj en Esperanto (La Hobito, Resurekto, Maigret hezitas, Malvivaj animoj), Hospodaĝeni ĈES, Malá rekapitulace, Kalendaro 2001, Nepoužívejte nálepky se starou adresou, Vzor pro vyplnění pokladní složenkou KB

**Starto 3/2001** (200): Okaze de Starto-jubileo, forpasis ThDr. Rudolf Horský, La vilao "Esperanto", 86-a UK Zagreb, Kongresaj mesaĝoj, Kongresa rezolucio, Sukcesa busvojaĝo al Kroatio, El la ferma parolado de la nova prezidanto de UEA, Cent jaroj de la organizita Esperanto-movado en Ĉeĥio, El la centjara agado en Brno, Koncize el la mondo, 90 jaro de Esperanto en Poděbrady, Ekspozicio kun konkurso de infandeseĝnaĵoj el la tuta mondo, La 19-a Ĉeĥa-Saksa Tago en Pirna sukcesis, Paroliga kurso, Výzva ke spolupráci, Abonoj de gazetoj, Detlev Blanke 60-jara, Harakumi en Havřířov, Somere lumegas la ĥihnidoj, 49-a SET Lančov, Kurso por instruistoj, Amikon montras malfeliĉo, La 37-a BET en Kaunas, Konferenco pri K. Píĉ, La vivo de Karolo Píĉ, Hetajro dancas, Lingvaj ludoj kaj enigmoj, Ĉeĥa Radio Vltava propagandis Esperanton (Najado), Kalendaro 2001

**Starto 4/2001** (201): La 8-a konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Poděbrady;



Konsultiĝo de Mez-Eŭropaj Landoj; Internaciaj biciklistaj renkontiĝoj; 20-a Ĉeĥa-Saksa Tago, OSIEK-premio 2001, 14a Internacia Kultura Festivalo, Jarkonferenco de fervojistoj, Ek al la UK en Fortaleza internacie jam el Prago!, IV-a kongreso de AEH-IKEH Janské Lázně, 11-a Adonido Ratíškovice, Internacia Jaro de Ekoturismo, Ĉestmír Vidman - 80-jara (En kimonoj, Humoro, Pacienco), Kun fervojo al tria jarcento, Katolika sekcio IKUE, Infanoj el Okříšky korespondas kun Japanio, Al Lingva demokratio!, Z. Bergrová: Kristnaska 2001, Prelegoj pri Ĉeĥa respubliko en Francio, Kunveno de najbaraj E-rondetoj en Lanškroun, Gajnis premion kaj alveturis ..., Bretona Esperanto-Koruso: KDo "MEVEN", Esperanta PEN-Centro dekjara, Muziko el Brazilo (Ni dancu en la rondo, Ho mia kor'), Ĉambro en la virtuala lernejo: La proverbejo, Kontakto, SAT kongresos en Svislando, Sekcio de informadiko, Prezentu vian urbon, Jan Filip, La Domo de TAKE, Hranice-Voorburg, I.T.R.E., Paroliga kurso - Asocia ekzameno, Esperanto en tramoj, Hoffmann en Esperanto, En Londona klubo, Lingvaj ludoj kaj enigmoj 8, Korektu jenajn frazojn, Nia filmo, Anoncetoj, 79-a Germana Esperanto-Kongreso, Supervido de Starto 2001, Dankon por la donacoj!, Platby do zahraničí, Korekto, Kalendaro 2001, Esperanta Silvestro en Česká Třebová, Kalendaro 2002, Jak platit svazu.

**PF 2002!**



## Dankon pro la donacoj!

Estimataj gesamideanoj, mi tre dankas al ĉiuj dumvivaj membroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kiuj sekve de mia petletero afable decidigis finance helpi al la ekonomia stato de nia asocio. Sume kolektiĝis danke al vi 36.000 Kč. Samtempe mi dankas ankaŭ al la partoprenintoj de la 8-a konferenco, kiuj donacis al la asocio pli ol 4.000 Kč. Mi certigas vin, ke la donacita mono estos utile uzita por disvolvo de nia movado. Plie mi dankas al ĉiuj, kiuj per sia aktiveco subtenas la asocion per sia laboro.

*V. Podhradská  
Prezidantino de ĈEA*

## Platby do zahraničí

Pokud si chcete objednat esperantské knihy ze zahraničí, např. UEA, můžete si na poště vyžádat **mezinárodní platební složenku MP1** a poslat na příslušnou adresu sumu v Kč, která pak bude poštou doručena v eurech v odpovídajícím kurzu (informaci o kurzu by Vám měli sdělit na poště).

## KOREKTO

En la artikolo "Okaze de Starto - jubileo" (n-ro 3/01) estis kelkaj malĝustajtoj. Neregula bulteno estis "Zprávy ČSEV" kaj en E. "Informoj de ČSEK". En la artikolo ne estis menciita Ĉeĥoslovaka Esperanto-Federacio, fondita la 20-an de decembro 1969 en Bratislava (kiu verŝajne estis neniam nuligita ???!).

*Pavel Polnický*

## KALENDARO 2001

24.11. Renkontiĝo en Lanškroun  
30.11.-2.12 Paroliga kurso, Olomouc  
8.12 Ĉeĥa-Saksa tago, Ústí n. L.  
29.12. E-Silvestro, Ĉ. Třebová

## Esperanta Silvestro en Česká Třebová



La jaron 2001 vi povas adiaŭi en la Kultura Klubo en Česká Třebová la 29-an de decembro je la 19-a horo (kiel kutime). Temo de la vespero: **folkloro en la Esperanta mondo** aŭ "kia nesto, tia vesto" (jaký kroj, tak se stroj). Ni ĝuos kristnaskajn kukojn faritajn de vi; la nomojn sur donacetoj skribu legeble kaj videble; kunprenu vian ŝatatan trinkaĵon; al dancado aŭ aŭskultado muzikas la okrestro de Josef Borýsek; enirbileto kostas 170 Kč (du vespermanĝoj, tosto, muziko); sindevigajn aliĝilojn sendu ĝis 10.12.2001 al Svatopluk Čech, Javorka 980, 560 02 Česká Třebová, post tiu dato telefonu al 0465 / 532788 (necesos alpagi 20 Kč). Laŭ via persona mendo ni prizorgos tranoktadon en fervojistaj trankojtoj (120 Kč por 1 persono kaj 1 nokto)

*Kore invitas vin EK en Česká Třebová*

## KALENDARO 2002

**aprilo** - dato anoncota - Ekoturisma seminario - Ŝumava

**19. - 21.4.** 11-a Adonido, Ratíškovice

**22.-28.4.** Esperanta seminario, Skokovy

**30.5. - 2.6.** 6-a Konsultiĝo de Landaj Esperanto Asocioj de Mez-Eŭropo, Rijeka

**7. - 9.6.** Paroliga kurso kaj asociaj ekzamenoj (loko anoncota)

50-a Somera Esperanto-Tendaro, Lančov:

**30.6.- 13.7.** I. etapo

**14.7.- 27.7.** II. etapo

**28.7.-10.8.** III. etapo

**11.8.-17.8.** ripoz-semajno (rekreační týden)

**20.7.-27.7.** 55-a IKUE kongreso - Kroměříž

**1. 8. - 16.8.** 87-a UK en Fortaleza Brazilo

**23.8.-28.8.** 5-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso - Verona (komuna karavano ne estos organizita)

**9. 9. - 14.9.** 2-a IBIRE Dobřichovice

**14.9.-21.9.** 4-a AEH-IKEH kongreso - Jánské Lázně

**8.11.-10.11.** Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST). Elektronikaj rimedoj - sub aŭspicio de UEA - Dobřichovice

**22.-24.11.** 10-a ĈEA Kongreso - 100-a jubileo de EK Prago

**decembro** - Paroliga kurso

**POZOR.** Nenašli jste svou akci v tomto kalendáři? Nahlaste ji do příštího čísla!

### Jak platit svazu

Nejlevnější způsob platby pro Vás i pro svaz je přímá platba u pokladny v kterékoliv pobočce Komerční banky. Vyplníte pokladní složenku (jsou v pokladně k dispozici) pečlivě ve všech kolonkách - tedy: měna účtu: Kč, č. účtu: 3330-021/0100, měna hotovosti: Kč, částka: slovy kolik platíte, jméno a příjmení, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně EK (sekce železn.) a místo do

kolonky - vklad jménem. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo na inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379. Seznam čísel:

**06940** ČES

**06941** UEA

**06942** předplatné Starta bez členství

**06943** dary ČES

**50100** sekce mládeže

**50200** sekce železničářů

**50400** sekce pedagogická

**50401** písemný kurs začátečníků

**50402** písemný kurs pokročilí

**50403** členství ILEI

**50500** sekce přátel SAT

**50600** sekce šachistů

**50700** sekce sběratelů

**50800** sekce nevidomých

**50900** sekce zdravotníků

**51000** sekce křesť. esp. KELI

**51100** sekce katol. esp. IKUE

**70100** komise pro tisk a inf.

**80200** ediční fond

**80300** propagace v tisku

**80400** fond Tilio

**Výzva:** Vzor pro vyplnění pokladní složenky KB při platbě ČES vyšel ve Startu 3/2001, str. 67. Pokud jste poukázali platbu a nejste si jisti, zda jste řádně vyplnili své jméno, napište tajemní-kovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.

Periodikum Českého esperantského  
svazu (32. ročník)

Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@clavis.cz;

www.clavis.cz/starto

Členská evidence a změny adres:  
Pavel Polnický, ČES

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
(32-a jarkolekto)

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ  
rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 9 eŭroj

(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)

Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, e-mail: starto@clavis.cz;

www.clavis.cz/starto

Presis: OPATISK Opava

ISSN 1212-009X

MALOVEC MIROSLAV  
BOSONOŽSKÁ 15  
625 00 BRNO

F259

28